



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 175

Novembro 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — kompostisto

Geoffrey Greatrex — preskontrolisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson

329 Poplar Drive

Dartmouth, Nova Scotia

KANADO B2W 4K8

bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter

71 RidgeValley Road

Halifax, Nova Scotia

KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$13



AMIKINOJ EL JAPANIO

Ekde 1981, NISHI Chizuko (Ĉizuko) kaj mi estas plumamikinoj. Kiel kutime dum la unua interkonatiĝa periodo, ni interŝanĝis fotojn, informon pri familianoj, vivstiloj, laboroj, domoj, landoj, kutimoj, ktp. Baldaŭ ni sentis nin kiel veraj fratinoj. Dum 1995, Chizuko kaj ŝia filino, Yoko, gastis kun Connie (Kani) kaj mi por la unua fojo. Estis ĝojega afero por ni finfine renkonti ilin.


Ĉi-jare dum oktobro, Chizuko kaj Yoko denove vizitis nin. Unue, ili flugis rekte el Japanio al Charlottetown, la ĉefurbo de la Insulo de Princ-Eduardo. Ili restis tie dum du tagoj kaj poste flugis al Halifakso, kie Connie kaj mi renkontis ilin ĉe la flughaveno. Kompreneble, tie okazis ĝoja renkontiĝo de malnovaj amikoj. Poste ni aŭtomobile vojaĝis laŭ la ŝoseo al nia dometo en kampara regiono de Nova Skotio. Ili deziris vivi kiel kamparaj loĝantoj en nia provinco ĉar, pasintfoje kiam ili restis ĉe ni, ni veturigis ilin al la vizitindaj lokoj de Nova Skotio kaj ne multe restis en la domo.



Do, ĉi-foje plejparte ni restis hejme. Ni vagadis tra la kampoj kaj vojetoj kiuj ĉirkaŭas nian hejmon kaj rigardis la buntajn foliojn en la arbaroj. Ili rajdis ĉevalon, helpis nin rikolti la cepojn kaj karotojn kiuj restis en la ĝardeno kaj preparis ilin por la vintra prezervado en nia legomkelo. Chizuko eĉ tondis



parton de la gazono per benzina gazontondilo. Nia Halifaksa-Dartmouth Esperanto- Grupo kunvenis ĉe ni por denove renkonti niajn amikinojn kaj babili pri diversaj aferoj. Chizuko portis japanajn dolĉaĵojn por manĝi dum la kunveno kaj ĉiuj ĝuis la bongustajn fremdajn manĝaĵojn. Ili deziris viziti niajn antaŭajn najbarojn (kiujn ili renkontis dum la pasinta vizito) kaj miajn fraton kaj bofratinon ĉe Musquodoboit Harbour sur la marbordo, do ni vizitis ilin. Chizuko donis al ĉiuj donacetojn kiujn ŝi kaj Yoko kunportis de Japanio. Ĉe la farmbieno de mia frato, Chizuko kolektis ovojn el la kokin-nestoj. La venontan tagon, ni manĝis tiujn freŝajn ovojn dum la matenmanĝo. Iun vesperon, ni ludis „Bingo-n”, ludo kiun Chizuko multe ĝuis. Dimanĉe ni vizitis la preĝejon, kie Chizuko donis al la pastro pli ol 60 falditajn paperajn gruojn kiujn ŝi hejme faris por disdoni al la kongregacio kiel simbolojn de amikeco kaj paco inter niaj landoj. La pastro estis kortuŝita per tia donaco kaj dum la meso li petis ke Chizuko kaj Yoko ekstaru por ke ĉiuj povu danki ilin.



Lastan viziton, ni havis pomerihundeton, kiu nomiĝis „Tiny” sed bedaŭrinde, intertempe li mortis. Nun ni havas alian pomerihundeton, kiu nomiĝas „Loki”. Niaj vizitantoj ankoraŭ memoris la hundeton Tiny kaj deziris viziti lian tombon en la kampo malantaŭ nia domo. Estas tomboŝtono tie kun la vortoj "Tiny 1998" gravuritaj sur ĝi. Antaŭ la fino de la vizito, niaj japanaj vizitantoj piediris dum sufiĉe longa tempo en la ĉirkaŭaĵo - ili tre ĝuis la brueton de la naturo en nia regiono kontraste kun la bruego de la grandaj urboj en Kanado kaj Japanio. Chizuko diris ke ĉi tie la oreloj ĝuas la silenton. Dum tiu lasta piediro, ili denove vizitis la tombon de Tiny kaj ornamis ĝin per sovaĝaj floroj.



Kiam ni alvenis ĉe la flughaveno por la hejmvveno de niaj gastoj, staris tie kvar malgajaj virinoj kaj unu malgaja hundeto. Ni ĉiuj ploretis dum la adiaŭoj sed mi esperas ke ni denove vidos Chizukon kaj Yokon post nelonge. Poste, kompatinda Loki serĉis por ili tra la domo dum kelkaj tagoj ĉar li ne povis kompreni ke ili forlasis lin kaj revenis hejmen.

— Kim Keeble

Redaktora rimarko: Chizuko tre afable korespondis post sia reveno hejmen: „Mi kaj Yoko multe ĝuis nian vojaĝon en Kanado. Ni povis sperti interesajn kaj ĝojajn renkontiĝojn kun esperantistoj kaj nekonataj, bonkoraj kanadanoj tie aŭ tie. Nun Kanado fariĝas la dua hejmlando nia.” Kiam mi mem adiaŭis ilin antaŭ kvin jaroj, mi ne vere kredis ke mi povos revidi ilin. Ĉi-foje mi estis pli kontenta diri „Ĝis la revido.”

La Redaktoro Pardonpetas – Denove:

Vi ricevas ĉi tiun numeron de INTER NI tre malfrue, kaj la decembra ankaŭ alvenos malfrue. Pro tio kulpas nur mi, la redaktoro. Jam la duan fojon lastatempe mi devas pardonpeti pro simila malfruenco mia, kaj tio ne estas la sola ekzemplo de hontinda malfruenco mia. Mi multe bedaŭras la maltrankviliĝon de miaj kunlaborantoj kaj la neceson de niaj legantoj atendadi. Pro tio mi pardonpetas.

— Bob Williamson

Esperanto ĉe Libro-Foiro

Dum la pasintaj kelkaj jaroj, diversaj urboj en Kanado festas ĉiujarajn libro-foirojn sub la nomo "Vorto sur la Strato" („Word on the Street”, anglalingva esprimo por "onidiro" kaj eble ankaŭ "lego ĉe la strato"). La foiro en Halifakso kutime estas muntata ja sur ĉefa strato, barilata kontraŭ trafiko, en aro da tendegoj kaj kutime okazas ĉu suno, ĉu pluvo ... Plu pri tio sube.

Multaj miloj da homoj de ĉiu aĝo travagas tien dum tuta dimanĉo en malfrua septembro. Multaj grupoj kaj librovendistoj partoprenas. Famaj kaj nefamaj verkistoj laŭtlegas siajn novajn librojn, ktp.

Antaŭ jaro kiam mi vizitis la foiron, mi multe bedaŭris la fakton ke nia loka E-rondo ne pripensis akiri budon. Do, ĉi-jare mi menciis tian eblon, kaj la grupanoj pretis dum multaj semajnoj por havi tablon en unu el tiaj tendegoj (pro kosto de \$170).

Aldone, la tagĵurnalo eldonus suplementon kun la foiro-tagordo kaj rilataj reklamoj. Ni aĉetis spacon por mez-eta reklamo, „Vizitu nian tablon”, belaspekte presita en la angla kaj esperanta apud verda stelo (pro \$115.) Ni ankaŭ aranĝis por havi vicon ĉe

laŭtlega mikrofono, por montri (t.e. laŭtlegi) erojn el *La Sankta Biblio*, *Winnie-la-Pu*, ktp.

Dume ni petis kaj ricevis 100 ekzemplerojn de la iom malnova inform-libro *Esperanto en la moderna mondo*, kiujn ni volis vendi por rabatprezo de \$5. Aldone al tiuj libroj, Steĉjo kunportis ekzemplerojn de libroj kaj gazetoj el la Libraro Ludovika. Kim kunportis Esperanto-standardon, poŝtkartojn el la tuta mondo, kaj albumojn de korespondaĵoj kaj aliaj aferoj de siaj junaj instruatoj.

Ankaŭ, mi longe volis fari novan eldonon de la *Unua Libro* de Esperanto (ties Angla versio), kiu estis nehavebla dum multaj jardekoj. La foiro donus al mi limdaton por finfine celi la projekton. Post du monatoj da klopodo, mi komputile reprenis la broŝuron, *Dr. Esperanto's International Language* (La Internacia Lingvo de D-ro Esperanto) de 1887, ĝustatempe por la foiro.

Do, post ĉiom da tia pretigado, la tago de Vorto sur la Strato alvenis. Kaj ankaŭ alvenis pluvego sur la strato. Ne nur pluvo, sed preskaŭ tut-taga pluvego.

Nia tablo ja ricevis sufiĉe da preterpasantoj por indiki nian ĉeeston, sed la vetero tre malmultigis la nombrojn. Ni nur vendis tre malmultajn el la libroj kaj broŝuroj.


Preskaŭ neniu aŭskultis nian 15-minutan laŭtleĝadon; mankis eĉ mikrofono, kaj la bruo de la pluvego preskaŭ superis la voĉojn de Bob kaj mi.

La tendego  iom ŝirmis nin de la pluvego, sed ne tute. Eĉ se la tenda

i n t e r n o e s t u s
(n u r i o m)
seka, ĉiu kiu envenis gutis akverojn sur la montraĵojn. Mi konkludis ke akvo kaj papero ne bone kuniĝas. Mi forte esperas ke la venonta foiro estos en tute kovrita stadiono aŭ halego.

Bona klopodo; bona semado; malbonŝanca forpluvado. Ni penu refoje.

— Gene Keyes



Deprimiga penso: sepono de via restanta vivo okazos dum lundoj.

Bona konscienco povas esti pruvo de malbona memoro.

Mi havas fotil-similan memoron; tamen al mi mankas filmo.

Diligenteco rekompencas sin en la estonto. Tamen, pigremo rekompencas sin nun.

